

PETER BALÁŽ

Slovak Online – interreta paĝaro por lerni la slovakan lingvon

Abstract (Slovak Online – Website to Learn the Slovak Language). The international youth organization E@I (Education@Internet) used its several years of experience in creating websites and managing the largest website to learn/teach Esperanto: www.lernu.net – and a project appeared to learn the Slovak language: www.slovae.eu. If you are interested in the Slovak language, love to travel and explore new countries, or if you have moved to Slovakia – here you can find plenty of useful and practical information, suggestions, and interesting information about Slovakia and the Slovak language. Slovae.eu also creates a community of those who are learning or are interested in Slovak.

Abstrakt (Slovak Online – strona internetowa do nauki języka słowackiego). E@I (Education@Internet) jest młodzieżową organizacją o zasięgu międzynarodowym. Wykorzystując lata doświadczeń w tworzeniu i zarządzaniu największą interaktywną stroną do nauki esperanto, stworzyła podobną witrynę, mającą służyć do nauki języka słowackiego: www.slovae.eu. Jeżeli interesuje cię język słowacki, uwielbiasz podróżować i poznawać nowe kraje lub przeprowadziłeś się do Słowacji, prezentowana strona jest źródłem przydatnych i praktycznych wskazówek, sugestii i ciekawych informacji na temat tego kraju i jego języka. Slovae.eu jest także miejscem spotkań osób, które interesują się Słowacją lub uczą języka słowackiego.

Enkonduke

Nuntempe lernado de fremdaj lingvoj per interreto estas ofta kaj populara lernomaniero. Bedaŭrinde, tia ebleco ne estis ĝis nun efektive utiligata por instrui kaj lerni la slovakan lingvon. Pluraj homoj, kiuj ekinteresiĝis pri la slovaka, povis ĝin lerni nur dum someraj kursoj (kiuj estas sufiĉe kostaj kaj okazantaj ne ĉiam en la plej taŭga loko kaj tempo) aŭ ili devis rezigni pri la lernado (aŭ provi memlernadon pere de lernolibroj, kiuj ankaŭ estas tre limigitaj kaj kutime ekzistas nur en la angla lingvo).

Rapida evoluo kaj populariĝo de komputikaj teknologioj ebligas krei multe pli simplajn, pli facile uzeblajn kursojn por fremdaj lingvoj. La teknologioj ebligas plibonigi ne nur teknikan estradon de la kurso, sed ankaŭ prezenton de la enhavo. Pro tiuj ĉi kialoj kreo de interreta kurso de la slovaka por eksterlandanoj estis taŭga kaj atendata paŝo.

Origino

La projekto Slovak Online (www.slovae.eu) ekestis surbaze de la internacia projekto „lernu!“ – multlingva retejo por lernado de Esperanto.

www.lernu.net estas interreta paĝaro por lerni Esperanton. Ĉi tiu projekto funkcias 9 jarojn (ekde decembro 2002) kaj nuntempe ĝi estas la plej granda retejo en la mondo por lerni Esperanton. La retejo estas tradukita al 33 lingvoj kaj ĝi havas pli ol 150 volontulaj kunlaborantoj (tradukantoj, instruantoj, korektantoj ktp.). En la retejo estas jam registritaj pli ol 100.000 uzantoj.

Danke al la spertoj pri kreado de reta Esperanto-kurso (en teknika kaj ankaŭ enhava flanko) E@I ekhavis ideon plilarĝigi la retajn lingvo-projektojn ankaŭ sur kampo de naciaj lingvoj. Celo estis komenci videbliĝi precipe la malpli grandajn eŭropajn lingvojn, kiuj nuntempe ankoraŭ ne disponas pri ebloj de reta lernado. Krome, sidejo de E@I estas en Slovakio, do bonega kandidato estis ĝuste la slovaka lingvo.

Celpubliko

Por kiu estas la projekto celata?

Por ĉiuj, kiuj volas lerni la slovakon lingvon:

- eksterlandanoj, loĝantaj en Slovakio
- anoj de miksitaj partnerecoj
- loĝantoj de ĉelimaj regionoj
- eksterlande loĝantaj slovakoj
- esploristoj de la slovaka kaj slavaj lingvoj
- enmigrintoj
- studentoj
- turistoj



Por ĉiuj jenaj celgrupoj la nova reta paĝaro ofertas eblon konatiĝi kun la slovaka lingvo jam hejme – en ilia lando, eventuale ili povas lerni bazon de la lingvo ankoraŭ antaŭ alveno en Slovakion. Tiamaniere videbliĝas Slovakio kaj la slovaka eksterlande (la kurso ebligas al granda nombro de interesiĝantoj senpage konatiĝi kun la lingvo kaj kulturo de la lando), samtempe la reta kurso ebligas al homoj lerni la lingvon pli rapide, pli flekseble (en libera tempo), per amuza maniero (ludoj, testoj, konkursoj).

Partneroj kaj subteno

La projekto estas internacia laboro de 6 partneraj organizoj el 5 landoj:

- Edukado@Interreto – Slovakio (kunordiganto)
- Lingvistika instituto de Ľudovít Štúr ĉe Slovacia akademio de sciencoj – Slovakio
- Studio GAUS – Germanio
- Universitato en Vilno – Litovio
- Akademio de komputila scienco, manaĝeraro kaj administrado en Varsovio – Pollando
- Slovaka centro en Londono – Britio

La projekto „Slovak Online“ estas finance subtenita de Eŭropa Komisiono. Ĝi eniras programon KA2-lingvoj, sub Tutviva Lernado de la agentejo EACEA (KA2-Languages, Lifelong Learning Programme). La projekto estas kreata en la periodo 2009–2011.

Enhavo de la paĝaro

En la multlingva paĝaro www.slovak.ee oni povas facile, rapide kaj senpage lerni la slovakan lingvon. La retejo enhavas diversnivelajn lingvajn kursojn (A1 kaj A2) kun multaj ekzercoj, amuzaj ludoj, vortaroj – ĉion por ke oni povu konatiĝi kun la gramatiko, lerni novajn vortojn kaj eĉ praktike komuniki en tiu ĉi lingvo kun aliaj uzantoj de la paĝaro aŭ utiligi forumon por diskutoj. Aldone oni povas tie trovi diversajn informojn pri Slovakio – mezeŭropa lando kun interesa historio, belega naturo kaj multaj turismaj lokoj.

Strukturo de la paĝaro

La ĉefa strukturo de la retej-enhavo estas jena:

Menuo

- Ĉefpaĝo
- Enkonduko
 - Pri la lingvo
 - Pri Slovakio
 - Interesaj faktoj
- Lernado
 - Lingvoprezento
 - Kurso 1
 - Kurso 2
- Gramatiko
- Ludoj
- Komunikado
 - Trovu amikojn
 - Forumo
- Biblioteko
 - Libroj
 - Publikaĵoj
 - Filmoj

- Muziko
- Ŝercoj
- Proverboj kaj diraĵoj
- Pri la projekto
 - Ĝenerale
 - Novaĵoj
- Teamo
- Kontakto nin
- Reguloj kaj kondiĉoj
- Privateco
- Paĝarmapo
- Informiloj

Enkonduko

En la „Enkonduko“ eblas trovi bazajn praktikajn informojn pri Slovakio, pri la slovaka lingvo kaj kelkajn interesajn faktojn en skiza formo.

Lernado

Temas pri la plej grava parto de la paĝaro. En tiu ĉi parto oni trovas ĉion eblan por lerni la slovakon lingvon: diversnivelajn kursojn kun multaj ekzercoj (por niveloj A1 kaj A2), amuzajn ludojn kaj testojn, liston de utilaj frazoj kun prononcado por turistoj, kaj memkompreneble gramatikon en kiu estas klarigataj ĉefaj gramatikaj temoj de la lingvo.

The screenshot shows the website www.ikso.net with a blue and white color scheme. At the top left is the 'slovakie.eu' logo. A navigation menu on the left lists: Ĉefpaĝo, Enkonduko, Lernado, Komunikado, Biblioteko, and Pri la projekto. Below the menu is a section 'Ĉu vi scias, ke...?' with a link to 'Plaj multe da turistoj al Slovakio venas de Ĉeĥio, Pollando kaj Germanio.' The main content area has a header 'Bonvenon en nia paĝaro!' and a large photo of three smiling people. To the right of the photo is a text block: 'En tiu ĉi multlingva paĝaro vi povas facile, rapide kaj tute senpage lerni la slovakon lingvon. La retejo enhavas diversnivelajn lingvajn kursojn (A1 kaj A2) kun multaj ekzercoj, amuzaj ludoj, vortaroj – ĉion por ke vi povu konatiĝi kun la gramatiko, lerni novajn vortojn kaj eĉ praktike komuniki en tiu ĉi lingvo kun aliaj uzantoj de la paĝaro. Aldone vi povas ĉi tie trovi diversajn informojn pri Slovakio - mezeŭropa lando kun interesa historio, beleaga naturo kaj multaj turismaj lokoj. Legu pli »'. Below this are two buttons: 'Ensaluti' and 'Kreu novan konton'. The page is divided into several columns: 'Malkovru Slovakion' (with a 'Legu pli' button), 'Lernu la lingvon' (with a 'Legu pli' button), 'Trovu amikojn' (with a 'Legu pli' button), 'Ni rekomendas' (featuring a 'GVK' logo and a cartoon illustration), and 'Novajoj' (with a list of recent news items and 'Legu pli' buttons). A language selection dropdown in the top right corner shows options: Esperanto (eo), Deutsch (de), English (en), Esperanto (eo), Français (fr), Lietuvių (lt), Polski (pl), and Slovenčina (sk).

Ekranprintaĵo de la hejmpaĝo

Komunikado

En tiu ĉi sekcio (uzebla nur por registritaj uzantoj) eblas konatiĝi kaj komuniki kun aliaj uzantoj de la paĝaro kaj tiamaniere profundigi siajn sciojn pri la slovakaj lingvo kaj Slovakio. Por diskutoj uzeblas ankaŭ forumo, kiu enhavas diverstemajn fadenojn rilatajn kun la slovakaj lingvo kaj Slovakio.

Biblioteko

En la menuero Biblioteko eblas trovi diversajn materialojn: slovakajn literaturajn verkojn, ŝercojn, slovakajn proverbojn, gazetojn, rekomendindan muzikon aŭ videaĵojn. Ĉiuj tiuj materialoj povas al lernanto helpi pli bone konatiĝi kun slovakaj kulturo.

Pri la projekto

Tiu ĉi sekcio enhavas ĉiujn gravajn aferojn pri la paĝaro kaj ankaŭ projekto mem – ĝeneralan priskribon, arkivon de novaĵoj (publikigataj en la ĉefpaĝo), priskribon de la krea teamo, eblon kontakti la kreintojn, detalan priskribon de la reguloj kaj privateco, plenan paĝarmapon kaj informilojn pri la projekto.

Speciala tradukejo

Por la projekto estis kreita speciala traduk-sistemo. Surbaze de spertoj de lernu.net pri multlingvaj projektoj aperis bezono krei similan tradukejon, kiun utiligas tiu ĉi paĝaro, sed pli modernan, kvalitan, kun specialaj bezonoj de tiu ĉi retejo.

The screenshot shows the 'Translation area' of the Slovak Online website. It features a sidebar with a navigation menu and a main content area displaying a list of translation tasks. The tasks are organized by text ID and include details such as the source text, the status of the translation, and the date it was completed.

Text ID	Source Text (Slovenian)	Target Text (Esperanto)	Status	Translated by	Date
#text1	Preĝaje al, sio a preĝo vznikol projekt Slovak Online a ĉo je cieľom tohto projektu.	Eksciu kiel kaj kial ekestis la projekto Slovak Online kaj kio estas celo de la projekto.	translated	salatina	2011-03-09 12:20:26
#text2	Informuje sa, ĉo je nové na stránkach Slovae.eu. Tu nájdete archív všetkých noviniek zverejňovaných na titulnej stránke tohto portálu.	Informiĝu pri novaĵoj sur la paĝaro Slovae.eu. Ĉi tie troveblas arkivo de ĉiuj novaĵoj publikigataj sur ĉefpaĝo de la retejo.	translated	salatina	2011-03-09 12:20:26
#text3	Tu nájdete zoznam a popis jednotlivých organizácií podieľajúcich sa na projekte Slovak Online.	Ĉi tie vi trovaj liston kaj priskribon de la unuopaj organizoj, kiuj kunlaboras pri la projekto Slovak Online.	translated	salatina	2011-03-09 12:20:26
#text4	Pomôžte nám našu stránku neustále vylepšovať! Uvítame všetky vaše pripomienky, otázky a návrhy na zlepšenie.	Helpu al ni daŭne plibonigadi nian paĝaron! Ĉiuj viaj rimarkoj, demandoj kaj plibonigaj proponoj estas tre bonvenaj.	translated	salatina	2011-03-09 12:20:26

Tradukejo de la retejo slovae.eu – tradukado en ĉenoj

La tradukejo por slovake.eu ebligas facilan aldonadon de novaj lingvoj por la paĝaro. Aldone ĝi forigas kroman teknikan laboron, ligitan kun aldonado de novaj tradukoj. La sistemo estas preparita por aŭtomata aperigo de tradukitaj tekstoj, kio signifas, ke se oni tradukas iun konkretan tekston al koncerna lingvo, tiu ĉi tradukaĵo sekve aŭtomate aperas en la retejo (en konkreta lingvo-versio).

Aliron al la tradukejo havas nur kunlaborantoj – do „kutima“ uzanto ne vidas ĝin. Eblas tamen tre facile doni rajtojn uzi ĝin al tradukemaj helpantoj. Tiam post ensaluto oni vidos kroman menueron en la menuo tute sube: Adminiejo, tra kiu eblas sekve eniri al la tradukejo.

Informado

Pri la projekto „Slovak Online“ kaj la retejo www.slovake.eu jam amase informis multajn amaskomunikiloj ene de Slovakio sed ankaŭ eksterlande. Ĉar simila projekto mankis en Slovakio, pluraj gravaj agentejoj, televido, radioj raportis pri la ekesto de la retejo. Aperigo de novaĵo en ĉefa vespera televida novaĵ-elsendo alportis multajn vizitojn (kaj sekve uzantojn) en la retejo.

Por pli vaste informi pri la projekto estis ankaŭ sukcese uzita Facebook (Vizaĝlibro), kie oni aperigas diversajn novaĵojn, rilatajn kun la paĝaro. Aldona eblo helpi daŭre disvastigi informojn pri la paĝaro ekzistas ankaŭ rekte en la retejo mem – en la sekcio „Pri la paĝaro“ estas submenuo „Informiloj“ (<http://slovake.eu/eo/about/information>). En ĝi eblas trovi diversajn inform-materialojn por elŝuto kaj plia uzo: oficiala logotipo de la projekto, afiŝoj, flugfolioj, kaj reklamrubandoj – tio ĉio en ĉiuj retej-lingvoj.

Estonto

La EU-subteno por la projekto finiĝas en oktobro 2011. Post ĝia fino estas plano daŭrigi la funkciigadon de la retejo kaj serĉi novajn fontojn de la subteno por ĝi. Pri la projekto devintus havi intereson ekz. Ministerio de edukado kaj Ministerio de kulturo en Slovakio. Ekzistas ankaŭ plano denove monpeti ĉe EU por sekva paŝo de la projekto.

Krom la serĉado de plua financa subteno estas ankaŭ planoj por la enhava pliriĉigo – konstruo de sekvaj kursoj (nivele B1 kaj B2), aldono de novaj ekzercoj, testoj, ludoj, aldono de pluj lingvoj (ekz. la hungara kaj la rusa).

Relative amasa uzado de la retejo (ĉ. 12.000 vizitantoj monate) en ĝia komenco konfirmas, ke ekzistas reala interesiĝo pri la projekto kaj ke ĝi povas plu funkcii ankaŭ en la estonto – eĉ en pli granda kaj pli riĉa versio.